

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

N-ro 8 \* 20. Nov. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

# Novaj Venkoj de Esperanto.

La semajna Ĵurnalo ekzistas.

Tutmonda Kongreso de l' Internaciaj Asocioj en Bruxelles esprimas sian favoron al Esperanto.

## ET semajna.

Depost la hodiaŭa numero „Esperanto Triumfonta“ eliros semajne. Ni kredas, ke ni rajtas tion ankaŭ kalkuli inter la grandaj sukcesoj de nia movado. Provizore la ĵurnalo povas esti nur kvar-paĝa; sed ni esperas, ke la nombro de la abonantoj kreskos kaj kreskados, tiel ke ĝi baldau povos eliri ses- aŭ ok-paĝe, kaj presite sur bona papero.

Al la ĝisnunaj abonantoj ni dankas korege; ĉar nur per ilia apogo estis eble al ni, efektiviĝi ĝis tie ĉi nian projekton.

Kuraĝe antaŭen!

## La Venko en Bruselo.

Esperanta Katedro de la Internacia Universitato.

La Universala Kongreso de la Tutmonda Unuiĝo de Internaciaj Asocioj havis lokon la 5-20 sept. en Bruselo, la ĉefurbo de Belgio. Dum tiu kongreso estis fondata Internacia Universitato, ĉe kiu okazis sciencaj prelegoj en franca, angla kaj hispana lingvoj. Flanke de la CO en Parizo estis starigita Esperanta Katedro, kie franclingve paroladis pri Esperanto s-ro Cense kaj s-ro Delvaux, kaj Esperante prelegis d-ro Wanverts de la Lille'a Universitato pri „Aplikado de la radiumo en la kuracado de la kancero“ kaj „nia Akademiano d-ro Corret el Versailles pri „La Radiotelegrafado“. Tiu Esp. prelegoj faris bongegan efikon sur la multnombraj aŭskultantaroj, kaj multaj ne-esperantistoj konfesis, ke ili komprenis pli facile Esperanton ol francan aŭ anglan lingvon.

Sed la plej grava sukceso por nia afero estas atingita — kiel skribas s-ro H. P. en „Esperanto“ — en la kongreso mem de la internaciaj asocioj, el kiuj 112 estis reprezentataj apartenantaj al ĉiuj partoj de la mondo.

La unua sukceso estis la venko de Esperanto kontraŭ Esperantido de s-ro de Saussure, kiu intencis proponi al la kongreso la starigon de delegaco por la elekto definitiva de internacia helplingvo. La delegito de d-ro de Saussure, d-ro Guillaume, prezidanto de la Esperantida Akademio, iris do al la kongreso kun la espero renkonti Esperantistojn kaj ldiistojn, kiuj akre sin kontraŭstarus kaj al kiuj li prezentus sian lingvan projekton kiel nuran rimedon por akordigi la du kampojn. Sed li renkontis nur Esperantistojn krom unu ldiiston... kiu aliĝis al Esperanto por ne plu malhelpi la rapidan solvon de la akcepto de internacia lingvo! En tia kondiĉoj la rolo de peranto, kiun Esperantido esperis ludi, estis tute senutila, kaj ĝia reprezentanto devis kliniĝi antaŭ Esperanto, kion, cetero, li faris grandanime. Rimarkindaj estis la modereco kaj la ĝentileco de la rilatoj inter la reprezentanto de Esperantido kaj la Esperantistoj, kiuj disigis tre amike, post kiam ili estis verkitaj la deziresprimon prezentotan al la kongreso je l' nomo de la sekcio de la artefaritaj lingvoj.

Kvankam la sekcio de la naciaj lingvoj estis proponinta la francan lingvon kiel helplingvon por la estontaj kongresoj, la kongresanoj, unuanime... krom la proponinto de la franca lingvo, voĉdonis por Esperanto! Rimarkinde estas, ke la prezidanto de la kongreso, s-ro Senatano La Fontaine, kaj la Ĝenerala Sekretario, s-ro Paul Orlé, direktoro de la Internacia Instituto de Bibliografio en Bruselo, persone apogis nian proponon, deklarante sin konvinkitaj Esperantistoj kaj instigis la ĉeestantojn lerni nian lingvon, por ke dum la estontaj kongresoj oni parolu nur Esperante!

Jen ege kuraĝiga rezultato, kiu montras la favoron ĉiutage pligrandigantan, kiun la publiko montras por Esperanto!

## Sukcesplena Kvina Kongreso de Italaj Esperantistoj en Bologna (3-5 Oktobro 1920).

La turumita, portik-ornamita Bologna estis la urbo de la kvina nacia kongreso de italaj Esperantistoj.

La preparoj al la kongreso surprizis ĉiujn ĉeestantojn: ne nur la presajoj estis multepromesaj, la organiza komitato estis sercinta kaj trovinta belegan kongresejon, salonegon de la „Fratellanza Militare“ (Via Marsala), kiu montris ankaŭ Esperantajn ornamojn.

La 5-an de oktobro je la 10-a oni malfermis la kongreson. S-ro Avo. Filippo Palmeggiano kiel prezidanto de la organiza komitato salutis la multnombrajn ĉeestantojn, precipe la delegitojn de la italaj ministerioj kaj de gravaj komercaj entreprenoj (multaj gravaj personoj, Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj), estis sendintaj leterojn kaj telegramojn, inter ili kelkaj ministroj kaj episkopoj) kaj provis konvinki la ne-Esperantistojn pri la beleco kaj uzebleco de la mondhelplingvo. La honor-prezidanto senatoro Pini faris fajran paroladon pri la interna ideo de Esp. Multaj Esperantistoj transdonis la salutojn de siaj grupoj. Ankaŭ eksterlanduloj alportis salutojn, ĉiuj Esperantlingve: s-ro Pedrazzini (Locarno) el Svisujo kaj s-ro d-ro Hotzelt (Nürnberg) el Germanujo. Post tiu solena inaŭguracio sekvis la elekto de la kongres-estraro, en kiun oni delegis la plej konatajn personojn de la itala Esp. vivo.

La programo de la traktadoj estis eksterordinare enhavoriĉa: oni nur aŭdis la temojn (kiuj estis belege kaj sinoptike presitaj en la manoj de ĉiu kongresano): raporto pri la kongreso en Hago, stato de la Esp. movado en Italujo, starigo de ĝeneralsekretariejo por propagando de Esp. ktp.

La unua parolado estis la raporto de s-ro Alberto Alessio pri la Universala Kongreso. Kiu jam aŭdis s-ro Alessio en Hago, tiu scias ŝati tuj la gravecon de tiu referato. S-ro A., kiu estis laŭ la ordono de la itala registaro en Hago, estis prezentinta al la kongresanoj ankaŭ presitan resumon de siaj spertoj dum la kongreso. Tiu lerta, iomete kritikita broŝuro estas leginda kaj respektinda de ĉiu samideano. Oni povis facile sekvi al la trafaj vortoj de la referato, ĉar (kaj en tio aperas la valoro de plej bonaj preparoj) de tiu kongreso) ĉiu kongresano havis presitajn ĉef-frazojn de la referato de s-ro A. antaŭ si. La ĉef-parolo ne estis ankoraŭ raporto pri la kongreso, sed sekvoj el tio por la farota laboro. Rekomende la parolanto akcentis la publikadon de Esp. precipe ĉe la ŝtataj registaroj. La detalaj punktoj estis tiel enhavoriĉaj, la pronokoj tiel trafaj, ke oni nur povas deziri, ke la pensoj de s-ro A. estu pritraktotaj kaj pripensotaj ĉe ĉiuj Esp-istoj de la tuta mondo.

Kion iniciatis s-ro Alessio, tion kelkaj aliaj paroladantoj klopodis estigi per siaj proponoj pri propagando. S-ro Umberto Toschi, kiu dediĉis ankaŭ al la fremduloj Esperantan gvidlibron tra la historio de Bologna, priskribis la unuan stacion de la Esp. movado en Italujo kaj mediojn de ĝia progreso. Li proponas la unuigon de Esp. organizadoj de Italujo por plialti la fortecon de la movado. Ankaŭ li volas havi sekretariejon ĝeneralan de propagando, kiun alia parolanto, s-ro Mandelli, kaŭzis. S-ro Toschi resumis siajn proponojn en granda, bone elpensita rezolucio (kiun ĉiu kongresano posedis), kiu estis ĉiuvocce aprobita.

Pri tiuj demandoj speciale italaj okazis granda kaj temperamenta vortobatalo, kiu tiel finiĝis, ke oni starigis komision el tri s-anoj, kiuj devas prepari pretan ellaboraton pri organizacio de itala Esp. vivo por la proksima kongreso.

La rezolucio mem havas jenan tekston:

„Konstatante la pli kaj pli grandan necescon je alprenado de internacia helplingvo, la tutmonda kongreso de la unuigo de l' internaciaj asocioj esprimas la deziron, ke ĉiuj, kiuj konfesas tiun necescon, aliĝu al la grava movado celanta disvastigi Esperanton por realigi tiun

Estas kompreneble, ke tiu ĉi ĉefafero de la italaj s-anoj forrabis la plej multan tempon. La ceteraj temoj: La lingvo Esp. kaj la progreso de la scienco, arto kaj industrio (P. M. Carolfi), Esp. kaj la rilatoj postaj-telegrafaj (d-ro Arturo Ghez, Triesto), Esp. kaj knaboskoltaj (Avo. Filippo Palmeggiano) — skoltaj, kiuj ne ankoraŭ komprenis Esp., servis al la kongresanoj — trovis malpli grandan intereson; kelkaj aliaj, tre interesaj kaj multepromesaj, ne estis preparolotaj pro manko de tempo.

La 5-an de oktobro posttagmeze oni decidis, ke la proksima kongreso okazu en Trento tuj post la internacia kongreso en Praha. Poste la kongresanoj surprizis kune la Monton St. Michele in Bosco kaj rigardis la mondkonatan ortopedian instituton kun multaj aparatoj por la sanigado de militinvalidoj kaj kripluloj.

La resumo el la plej gravaj traktadoj de la kongreso estis rilate al la propagando la unuigo de italaj Esperantistoj, rilate al la praktika uzado de Esp. la ekkono, ke tio, kion Esperantistoj volas, estos atingata nur, se Esp. estos instruata kaj uzata de la ŝtataj kaj publikaj registaroj.

La sukceso de la kongreso momente ne estas ekkonebla, sed oni povis vidi, ke rimarkindaj kaj celkonsciaj fortoj estas je la laboro por marŝigi la italan Esp. movadon, kaj kelkfoje ŝajnis, ke Italujo baldau, se la bonaj komencoj de tiu ĉi kongreso estos plenumataj kaj efektivitaj, marŝos je la pinto de la samideanaro.

Kiel sola fak-organizacio la katolikaj Esperantistoj okazigis apartajn kunvenojn. Krom du diservoj kun prediko de p-ro Carolfi kaj p-ro Don M. Biscaglia (Trento) estis du kunidoj en la salono „dei Fiorentini“ (Corte de Galuzzi), kiu montrigis bedaŭrinde multe tro ampleksa (aŭ pli ĝuste la ĉeestantoj estis tro malmultaj).

La katolika Esp. movado estas ja nur en la komencoj. Sed oni energie iniciatis la aferon.

Post kelkaj salutvortoj de la ĝenerala sekretario de Internacia Katolika, d-ro Megger (Graz), kaj de la landdirektoro de Ika por Germanujo, d-ro Hotzelt (Nürnberg), oni aŭdis la raporton de s-ro Alessio pri la Sesa Kongreso de Katolikoj en Hago. Li limigis raportin, sen iu vorto de kritiko, kiu ludis ne malgrandan rolon en lia unua raporto pri la Universala Kongreso. Oni ankaŭ tuj pri-traktis la demandon de la organizado de katolikaj italaj Esperantistoj kaj je tiu okazo oni ankaŭ tuŝis la okazintaĵojn ĉe la „Sesa“ en Hago. S-ro d-ro Hotzelt elmetis, kiel oni en Hago iomete rapide mortigis la IKLUE, kaj fondis la Ika sen havi anstataŭaĵon por la grava tasko de IKLUE kaj konstatis ankaŭ, ke tio tute ne fariĝis sen la kontraŭdoro de kelkaj kongresanoj kaj multaj eminentuloj de la katolika Esp. movado, kiuj ne povis partopreni la kongreson. Oni speris, ke ankaŭ la itala katolika Esperantistaro havis la opinion, ke oni tute bezonante la Ika ne povas malhavi la por-Esperantan organizacion IKLUE. Rezolucio pri tio kaj fondo de katolika unuigo de italaj Esperantistoj finis la diskutadon.

Kiel direktoro de Ika por Italujo estis elektata s-ro p-ro Carolfi, la gvidanto de la katolika Esp. movado en Italujo; krom tio oni nomis kelkajn delegitojn de Ika. Ĉefpunkto de la katolikaj kunidoj estis ankoraŭ la komunikoj de s-ro p-ro Carolfi pri Esp. en la seminarioj. Li raportis pri

(Daŭrigo sur la dua paĝo.)

grandan progreson, prokrastante ĉian plibonigon, kiu montrigis necesa, ĝis la tempo, kiam la internacia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj.“

La redakcio de ET rezervas al si la preparadon de tiu ĉi gravega rezolucio kaj ties konsekvencoj en sekvontaj numeroj.

la ĝisnunaj sukcesoj en tiu rilato kaj iniciatis, ke en ĉiuj seminarioj de pastrigantoj oni enkondukdu Esp. kiel devigan fakon. La efektivaĵo de tiu iniciato promesas grandan sukceson. Tiurilatan rezolucion oni volas sendi al la Itala Episkoparo.

Ankaŭ la katolika itala kongreso estis konsiderinda sukceso kaj progreso de la Esp. movado.

D-ro PELEGRINO.

El la oficiala raportoj ni aldonas jenon:

Oni decidis, ke la tuta itala Esperantistaro bataladu kune sub unu flago, t. e. estu organizata en la F. E. I. (kiu ekzistas jam de 1910); ke oni akceptu la proponojn de prof. Alessio (pri stango de Centra Oficejo), de s-ro Toschi (pri organizado), de s-ro Mandelli (pri propagando); ke la sidejo de la Centra Komitato estu Milano; kaj oni elektis membrojn de la Centra Komitato d-ron A. Filippetti, libroteniston A. Mandelli kaj d-ron P. C. Monti kun jenaj taskoj: modifi la regularon de la F. E. I. kaj fari aldonojn necesajn; organizi la italan samideanaron; eldoni unu monatan (se eble duonmonatan) oficialan gazeton; starigi Centran Oficejon de Esperanto; fari laŭ la disponotaj monrimedoj plej efikan propagandon por disvastigi nian lingvon kaj la internan ideon de Esperantismo.

Ni atentigas pri la nova adreso de la „Itala Esperantista Federacio“; ĝi estas, same kiel tiu de la redakcio de la oficiala organo (Itala Esperantisto, eks-Esperanto Itala Revuo): Via Spiga, 29, Milano.

## Esperanto kaj Laboristaro.

Intersindikata Grupo Esperantista (Laborborso) en Marseille (Franc.)

Dank' al nia kamarado Moreno (Maurin), del. UEA, la Esp. movado, precipe en la laborborso, en Marseille multe progresis. La juna Intersindikata Grupo Esperantista nun fariĝas pli granda kaj pli fortika en la laborborso, ĝi estas jam bone enradikiĝinta. Elementa kaj supera kursoj funkcias sub la gvidado de k-do Moreno helpata de fervoraj kaj kapablaj samideanoj, Michel Verlaque k. a. Kursoj sukcese finiĝis per prezento de 12 ges-anoj al Esp. ekzameno, ĉiuj atingis la Ateston pri Lernado.

Dum aŭgusto, kiam la komiso pri la profesiaj kursoj aranĝis ekspozicion en la laborborso, IGE havis sian lokon kaj ĝin profitis. La vizitantoj povis rimarki sub la verda standardo kaj sub la fotografado de d-ro Zamenhof la korespondadon de la lernantoj kun la tuta mondo, gazetojn el ĉiuj landoj, komerc-korespondon, literaturan fakon ktp.; ĉiuj lokaj gazetoj parolis pri tiu Esp. ekspozicio, kaj la laŭdoj estas precipe por niaj fervoraj ges-anoj f-ino Dalfin kaj s-ro Ramon Xorras.

La 22 aŭg. oni disdonis diplomojn al la lernantoj de la profesiaj kursoj; lernantoj de Esp. ankaŭ ricevis diplomojn kaj premiojn; estas dirinde, ke la komiso de la laborborso de l' metiaj kursoj subtenis morale kaj mone la Esp. kursojn, kiuj estis asimilitaj al la metiaj kursoj. La honoran premion ricevis nia rusa s-ano Malisef Serĝe.

La mono konsentita de tiu komiso (pli ol 800 fr.) estis por la propagando; ni ŝuldas tiujn gravajn servojn al la agemo de k-do Moreno, kiu senlace insistis ĉe la laboristaj batalantoj.

Al la interna ideo nia IGE pruvis sian fidelecon: ĝi helpis per sendo de broŝuroj kaj mono al algeriaj militkaptitoj rusaj; ĝi kolektis dank' al

la sindono de greka k-do, kiuj parolis en grupoj Claré, Etudes Sociales, bulgaraj grupoj, monon por la aŭstriaĵ infanoj, precipe por tiuj de Graz; ĝi subtenis internaciajn gazetojn kaj la francan „Esperantista Laboristo“; ĉefaj k-do-joj de la grupo anigis al Liberiga Sielo, UEA ktp. (UEA atingis nombrom superan al la antaŭmilita).

Krom la kutimaj kursoj okazantaj ĉiulunde kaj ĉiuvendrede je 7 h. vesp. en la laborborso, aliaj kursoj funkcias ĉe la Eksbatalantoj (ARAC), 6 Cours St. Louis. Notinde, ke tiu sidejo estas samtempe tiu de la Socialista Partio, de l' grupo Claré, de la Junularo Socialista — favora medio, kie certe ni plene sukcesigos Esperanton.

Italaj, holandaj, hispanaj kaj rusaj samideanoj vizitis nin; kelkaj restas inter ni, kaj la skeptikuloj povas aŭdi en nia grupo nian karan Esperanton parolatan de diversnaciaj.

Laŭ ĉio, la propagando ekfiniĝinta. estis tre fruktodona kaj kuraĝigis nin rekomenci novan, laborante pli vigle kaj pli fervorege se eble, por ke Esperanto triumfu. Por tio ni iros ĝis la fino. Antaŭen! Antaŭen!

## Scienco.

NOVA KOMPREENO DE LA VIVO  
KAJ ĜIA

PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO.

(3-a daŭrigo.)

Similaj pensoj, kiaj ĉi tiuj unue kun plena klareco elparolataj de Hirth, laŭtiĝis jam ĉe medicinaj verkistoj. Tiel skribis Abu kaj Neuberger en sia bodega „Fiziologio kaj Patologio de la mineralstoff-sango“ sur paĝo 96:

„Eble la tempo ne estas malproksima, kiam oni povas paroli pri fiziologia kaj patologia hemio de la ideoj.“

Tiel Frankenhäuser en siaj ambaŭ broŝuroj: 1. „Fiziologiaj fundamentoj kaj tekniko de la elektroterapio“), Stuttgart 1906; 2. „La rilatoj de la elektraj fortoj al la organismo vivanta“), premisas la elektran funkciadon kiel ion memkomprenblan, ne motivante sian hipotezon. Schleich, konata germana ĥirurgio, en sia spiritepla plej nova verko „Pri ŝaltmekaniko de la pensoj“ (Vom Schaltwerk der Gedanken), nomas la nervforton ĉiam elektrodo. Li do hipotezas, ke la forto estas simila al la elektro. S. Garten skribis en la lenrolibro de la komparanta fiziologio de Winterstein (1910):

„Oni apenaŭ maltratos, se al ĉiu ĉelo de besta aŭ planta naturo oni alskribas la kapablon, produkti fluojn elektrajn, kiom entute protoplasmaj iritebla estas konsiderota. Kie tiuj bio-elektraj fluoj ĝis nun ne estis konstateblaj, tie maksimume la malgrando, malfavora ordigo de la ĉeloj kaj eble la eto de la fortoj elektraj devas esti rigardataj kiel kaŭzo de ĉi tiu ŝajna manko. Por la fiziologo la ĉefa signifo de ĉi tiu elektra aperaĵo estas vidota en tio, ke ĝi prezentas signifon fidindan kaj ne tro malofte la solan de la irita procesuso. Komparanta priskribo de la fluoj biologiaj do samtempe povas liveri superrigardon pri paso de la procesuso irita en la plej diversaj protoplasmaj formoj.“

Por kompreni la tratabantan signifon de la salhidrato por ĉiuj vivprocesusoj, ni devas al ni profunde enradikiĝi du aferojn:

Unue ne temas pri la simpla adicio de la ecoj de akvo kaj salo, percepto, de kiu la pli frutempa

1) Germane aperinta.

2) Germane aperinta en la jarkursoj de la kuracista perfektigo (Jahreskurse für ärztl. Fortbildung) 1910, 8-a kajero.

fiziologio eliris parolante pri akva ekonomio kaj sala ekonomio de la organismoj. Pli vere kie ajn rilatas al akvecaj fluidaĵoj kaj duonfluidaĵoj, ni devas memori, ke jen la antaŭe skizitaj kunigoj potencaj. Ĉar en la korpoj vivantaj ne ekzistas pura akvo, sed nur elektrolitoj, t. e. konduktoraj de dua klaso kaj neelektrolitoj, t. e. dielektraj substancoj, barantaj la elektron.

Kiel en lokomovivo ne akvo pluas varmego estas forfonto, kiu vere estas serĉota en la ekspansio de la gasmolekuloj, tiel en la salhidratoj de la organismo la tonoj kaj iliaj ŝarĝoj elektraj formas la efikan potencon. Longe antaŭ ol en la evolua historio aperis propra sango, ni havas la sal-solvajn kiel necesan faktoron de la vivo. Sen tio entute ne ekzistas vivantaj organismoj, kontraŭe ni konas tiajn, kiuj vivas sen oksigeno kaj sen albumino, ja, ĉe tiajn, al kiuj la oksigeno malutilas.

La plej eminenta germana fiziologo Abderhalden skribas en sia „Lernolibro de la fiziologia hemio“ paĝ. 544:

„Ĉirkaŭ niaj organoj fluas fluidaĵo simila je marakvo. Tio valoras por ĉiuj vertebruloj. Ke la protoplasmo en la ĉeloj de la plej multaj marlogantoj troviĝas sub tute egalaj kondiĉoj, kiel de la pli altaj, estas certe biologie signifa malkovro. Ĝi interligas la bestspecojn pli alte evoluintajn kun la pli primitivaj vivestaj.“

Nun oni nur komprenas la taskon de la cerbomedola fluidaĵo (latine: liquor cerebrospinalis) estanta en la ventrikoloj de la cerbo kaj ĉirkaŭfluanta la medolon. Jen simple la elektrolito, el kiu cerbo kaj medolo prenas sian funkciadan forton elektran. Laŭ Ščerbakof ĝi entenas 0,81% da mineralsubstancoj.

Kiujn pruvojn Georg Hirth plue alportis por sia aserto, ke elektro estas la ĉefa funkciada forto de nia korpo? Hirth mem ĉiam parolas pri elektrohemia aktiveco; sed ni hodiaŭ konjektas, ke la reakcioj hemiaj lastafunde estas elektraj, ĉar nur ionizitaj atomoj kaj molekuloj plenumas hemian laboron. Mi do parolas simple pri elektra aktiveco, entenanta laŭ ĉi tiu percepto jam la hemian.

Al Hirth mem la unua lumradio pri lia ideo venis per observado al alkoholefiko. Li diras pri tio jenon: „La malpliigo alkohola de la energio ĉe la homo ekas jam komence de la eŭfora ekscita stadio, dum kiu ĉiu azeno sin opinias spiritulo, sed kio ne malhelpas lin samtempe fari la plej grandajn malprudantaĵojn kaj ĉiuspecajn ekscesojn. Plej multe da traĉipikadoj, brutecoj, ankaŭ veneraj infektoj rekondukigas al tiu ĉi agrabila dispozicio. Tiam sekvas tre baldaŭ stadio de ĝenerala depresio, la postdrinka mizero; kio ajn havas kapon, dependigas ĝin. Malgraŭ rapidigita pulsato — la koro laboras per reguleco perturbata — kaj malgraŭ pli granda subjektiva varminto, la temperaturo konstante estas malpliiganta ĉe ebruloj en la freŝa aero ĝis 24°C. La komence pozitive ekscianta efiko, ĉe aliaj narkotaj observata, malkas al la alkoholo; la pliiĝita agitacio<sup>1)</sup>, la tro memfido kaj la tuta eŭfora konduto estas nur bazitaj sur malpliigo de la malhelpo<sup>2)</sup> kaj koordinacio, do laŭ mia percepto, sur paralizo de la elektrohemia aktiveco. En kaŭza konekso je tio estas la perturbado de la ŝtofsango kaj de l' spirado. Alkoholo estas antipiretikaĵo plej malbonspeca paralizanta la energion ĉiufanke.“

(Daŭrigota.)

D-ro W. WINSCH.

1) Tio estas medicina esprimo por pliiĝita movebleco.  
2) Germane: Hemmungen.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Marja Sidlovskaĵa.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

(4-a daŭrigo.)

III.

Pasas unu tago, pasas alia. La suno subiras en la maron unuflanke, leviĝas matene el la maro aliaflanke. Plaidiĝas la ondegoj, preteriras nebuloj; mevoj flugas post la ŝipo, ripozas sur mastoj, poste, kvazaŭ deŝirataj de vento, balanciĝas en la aero, simile al blankaj paperetoj, kaj flugas returnen, ĉiam returnen, revenante al Eŭropa lando, kiu niaj Loziŝanoj por ĉiam estis forlasintaj. Mateo postekvavas lin per la okuloj kaj ekspiras. — Jen! — ni pensas: — mevo timas flugi pluen, dum ni flugas. —

Kaj antaŭ liaj okuloj aperas pina arbaro, sub la arbaro — rivereto, ĉirkaŭita de palaj salikoj, trans la rivero — mizeraj dometoj, kovritaj per pajlo. Kaj ŝajnas al li, ke volonte li nun revenus tien por ree travivi sian malfeliĉon, tiel intiman, tiel multe konatan!

Dume la maro obtuze batas la randojn de la ŝipego, kaj la ondoj kvazaŭ montoj, leviĝas kaj malleviĝas, kun bruego, kun ĝemegoj, kvazaŭ ili samtempe minacas kaj plendus. La ŝipego kliniĝas pli kaj pli, ŝajne, ĝi estas renversigonta, sed jen — ĝi ree komencas releviĝi, ĝemante kaj knarante. Fleksiĝas kaj knaras la mastoj, vento seke fajfigas la ŝnuregojn, kaj la ŝipo ĉiam iras kaj iras: super la ŝipegoj lumas la luno, super la ŝipego etendiĝas malluma nokto, super la ŝipego melankolie pendas nuboj, aŭ fulmotondro bruegas kaj muĝegas en la oceano, kaj fulmaj saĝoj dronas en la ondiĝanta akvo. Sed la ŝipego ĉiam iras kaj iras . . . .

Mateo Timono estis ĝenerale homo silentema, sed ofte li havis pensojn, kiujn li neniel povus esprimi per vortoj . . . . Kaj neniam ankoraŭ lia kapo estis tiom plena je pensoj, neklaraj, nedifinibla, same kiel ĉi tiuj nuboj aŭ ondoj, same profundaj kaj neklarigibla kiel la maro. La pensoj naskiĝis kaj mortis en lia cerbo, kaj li ne povus, li eĉ ne penadis ilin rememori, li sentis nur, ke pro tiaj pensoj io moviĝas kaj ekscitiĝas en la fundo de lia animo, sed li ne povas diri, kio . . . .

Vespere la oceano mallumiĝis, la ĉielo estingiĝis, kaj la supraĵo de l' ondoj eligadis eksterordinaraan brilon. Foje Mateo rimarkis, ke la ondo, forkuranta el sub la pinta ŝipnazo, ŝajnas iel tro blanka en la mallumo, jam de longe envolvinta la ĉielon kaj maron. Li kliniĝis malsupren, rigardis al la profundegoj kaj rigidiĝis . . . .

La akvo apud la ŝipo lumis; en la akvo malrapide moviĝis palaj faireroj, jen ekklamante, jen estingiĝante, aperante sur la supraĵo aŭ ree dronante en terura, mistera profundego . . . . Al Mateo ekŝajnis, ke ĉio ĉi estis vivanta: la naviganta ŝipego, la ondoj plende bruegantaj kaj ĝemantaj, kaj la moviĝanta oceano, kaj la ĉielo en mistera silento. Li rigardadis al la profundegoj, kaj al li ŝajnis, ke al tie li lin ankaŭ rigardas. Li nekonzata, iu mireginta, iu terurita kaj nekonzenta . . . . De terete la oceano iras sian vojon, de eterne leviĝas kaj malleviĝas la ondoj, de eterne la oceano kantas sian propran kanton, nekomprenblan por la homaj oreloj, kaj de eterne en la mara profundegoj pasas ĝia propra vivo, kiun ni ne konas. Kaj nun, en la mezo de ĉi tiu deeterna harmonio, de ĉi tiu viva movado ekaperis la aroganta ŝipo kun sia ritma antaŭtenado . . . . Pro tio la kanto de l' oceano ektermis kaj ŝanĝiĝis, la ondoj estas distranĉataj kaj kunmiksetaj, kaj iu teruregite aŭskultas en la profundegoj la iradsonojn de ĉi tiu fremda monstro, venanta el alia fremda

mondo. Komprenoble, Lozinski ne povus rakonti ĉion ĉi tion per tiaj paroloj, sed li sentis teruron antaŭ la mistero de l' mara profundego. Li imagis, ke dum li, plena je teruro rigardas de supre, — iu kun sama teruro, rigardas lin de tie, de mal-supre, rigardas kaj koleras, kaj elirigas sian sentaron kun fajroj, kaj la senditaro elnaĝas supren kaj moviĝas tien kaj reen, ion ekscias, pri io interkonsiliĝas kaj tamen malĝaje, revenas en la maran profundegon, nenion kompreninte . . . .

Dume la ŝipego ĉiam kuras kaj kuras, nehaltige kuras al sia propra celo . . . .

Multajn pensojn havis Mateo en tiuj horoj, — domaĝe, ke ĉiuj tiuj pensoj leviĝadis kaj malleviĝadis, kiel ondoj ne postlasante videblajn postsignojn, ne enkorpiĝante en preta parolo, ekflagrante kaj estingiĝante kiel la profundaj maraj fajroj. Cetere Mateo diris al mi post kelkaj jaroj, ke la maron li neniam forgesos.

„Homo multon pensas, kiam li estas sur la maro,“ li parolis: „multon ĉiuspecan pri si mem kaj pri Dio, pri la ĉielo kaj pri la tero . . . . Diversajn pensojn havas homo meze de l' oceano, jes, mia sinjoro, pensojn pri la vivo kaj pri la morto . . . .“ Kaj laŭ liaj okuloj estis videble, ke iu fajreto penas supreniĝi el la nekonzata profundego de lia simpla, malklera animo . . . . Do, ĉiukaze, la maro ion engravuris en lian animon . . . . Sendube, iaj postsignoj restis. Lia animo balanciĝadis kiel maro, en lia koro moviĝis sentoj, similaj al ondoj, lafoje larmo plenigis liajn okulojn, iafoje — ridindaĵoj! — li, viro sana, fortika havis deziron sin ĵeti kaj flugi, flugi kiel tiuj mevoj, kiuj ree estis sin montrantaj verŝajne jam de l' amerikaj bordoj. Flugi ien malproksimen, kie estingiĝas vespera ĉielruĝo, kie vivas homoj bonaj, feliĉaj . . . .

(Daŭrigota.)



# Esperanta Kroniko.

## Danzig.

La 24. okt. okazis propaganda vespero en Pr. a. u. apud Danzig. Paroladis ĉiuj poŝtsek. Ketterling kaj instr. Amort. Unuakta teatraĵo montris la vivecon de Esp. Por kurso gvidota de s-ro bankoficisto stud. rer. pol. Hoffmann anoncis sin 18 partoprenintoj.

## Germanio.

**LERNEJOJ.** En la kunsido de la Breslaŭa urba lernejo-deputato de la 3-a de nov. oni decidis, ke Esp. estu enkondukata en ĉiujn lernejojn de Breslaŭ kiel libera voĉo fako. Per tio oni volas ebligi, ke forlik-bezonantaj infanoj oni povu sendi eksterlandajn pligrandnombre ol ĝis nun. Anoncis sin jam pluraj geinstristoj por senpaga instruado.

**WILHELMSHAVEN-RÜSTRINGEN.** Esp. grupo „Jadegolf“ aranĝis tri novajn kursojn kun 80 partoprenintoj. La kurso okazas en urbaj lernejoj kaj por la katolikaj societoj en „Kölping-Dom“. La estraro de la bankoficista unuigo rekomendas la eklernon de Esp.

## Hungario.

**MISKOLC.** Kurso de d-ro Györy Nagy komencita kun 8 pers., finiĝis kun 10 partoprenintoj, lastjaraj gimnaziintoj kaj komerc-lernejaninoj, kiuj nun jam vigle korespondas.

## Polio.

**BYDGOSZCZ.** La Esp. movado ĉi tie bone progresas, dank' al kelkaj nelacaj lokaj s-anoj. La 17 sept. okazis referendo de la jam ekzistinta ligo „German-Pola Esperantisto“. La referendo estis necesa, ĉar multaj germanaj s-anoj elmigris. Enskribiĝis proksimume 50 s-anoj. Kiel prezidanton oni elektis s-ron prof. Kronenberg, kiel vicprez. s-ron red. Pankraŭ. La kunveno okazas mardo kaj vendrede je la sepa horo en la urba liceo. Nova kurso komenciĝos en nov. Kursojn kun 20 katolikoj gvidas s-ro prepozito Becker. El la ĉi tie gzetaro propagandas Esp. la germana „Volkszeitung“ (red. s-ro Pankraŭ) kaj la pola „Nowe Tory“ (red. s-ro Kronenberg). Ĉiu numero de ambaŭ gazetoj alportas interesajn sciigojn pri Esp. aŭ ĉiun tradukon el Esp. La ceteraj gzetoj estis esperantemaj; eĉ unu pola gazeto de malfavora Esp. presis longan priestranatan artikolon de prof. Kronenberg. Estante bibliotekisto ĉe la urba biblioteko, s-ro Kr. aranĝas specialan fakon por la Esp. libraro. Bydgoszcz fariĝos verŝajne la centro de la Esp. movado, se ne de la tuta, iam de Grand-Polio (iam germ. teritorio).

## Recenzoj.

### GAZETOJ.

**ESPERANTA FINLANDO.** Okt. Kiam interesa ilustr. raporto pri sporto en Finnlando kaj Finnio en sporto. Resumo pri la internacia Esp. movado inter laboristoj. Artikolo pri la nuna Esp. gzetaro, plejparte kun trafika kritiko. Letero de prof. Ramstedt, finna ambasadoro en Tokio, kiun ni prepus, se ni havus pli da spaco. Kroniko kaj anoncoj.

La Esp. oficejo Finnlanda troviĝas nun ĉe „Movado“, Kasarminkatu 20, Helsinki.

**ESPERANTO.** Okt. Tre diversspeca enhavo. La plej grava sciigo estas la deziresprimado de la kongreso de internaciaj asocioj favora al Esp. Leginda artikolo pri „La penso de Einstein“. La nova statuto de UEA, ktp.

Nova adreso de UEA: 12, Boulevard du Théâtre, Genève.

**ESPERANTO-PRAKTIKO.** Nov. La kongresoj en s-Gravenhage. Literaturaĵoj. Por perfektigo ktp.

**ESPERO KATOLIKA.** Okt. Kun la ĝoiga sciigo, ke la Sankta Patro en Romo honoris la gazeton resp. ĝiajn direktorojn kaj kunlaborantojn per Apostola Beno. Daŭrigo de la oficialaj raportoj pri la Sesa.

**GERMANA LABORISTA ESPERANTISTO.** Okt. Adreso: Hannover, Asternstr. 56, Jarabono 5, 80 mk., eksteri. 10 mk. Kun dulingva titolo kaj teksto.

**KRISTANA ESPERO.** N-ro 3. Kun interesa priskribo de propagando-vojaĝo libertempa tra Finnlando.

**LABORO.** Okt. Raportas pri aresto de socialistaj Esp. kursanoj per Esp. policanoj. Kelkaj pliaj interesaj artikoloj.

**LA SLIDA KRUCO.** Sept. Ke la organo de la aŭstraliaj Esperantistoj regule eliras, estas bona signo. Interesa sciigo, ke en la malliberejo de Auckland en Nova Zelando ekzistas grupo de Esp. malliberaloj.

**MONATA BULTENO de „Aplech“ Esp. Grupo, Sabadell.** Okt. Aperos 1921 sub nova titolo „La Semisto“, Jarabono 3 pes. (12 resp.-kup). En kataluna lingvo kaj en Esp. Represis interalie la leteron el Stirio de J. Mader, tradukitan el ET (Internacia Esp. Servo) en la katalunan lingvon.

**VERDA UTOPIO.** Osaka, Japanio. Aŭgusto. Oni jam nomis ĝin „dua Esp. Finnlando“; efektive ĝi estas nur eta, sed belaspekta revuo kun ilustraĵoj en japana maniero, kvankam la stilo parte sonas iom stränge al la oreloj de eŭropanoj. Adreso: 5265 Uehommachi 7-bome Minami-ku, Osaka, Jarabono 3 Yen.

**ESPERANTIDA.** Okt. Kvora raporto al la Esperantida Akademio (pri la misio de la delegitoj de l' Esperantida Akademio al la Brusela Mondkongreso kaj pri la unua vivjaro de la lingvo Esperantida). Artikolo de Antido: „Pri la Brusela Kongreso“.

**THE ARBITRATOR.** Organo de la Internacia Arbitracia Ligo. London SW 1. Kun artikolo „The German use of Esperanto“, de J. Bredall. La aŭtoro pritraktas la dumilajn uzadon de Esp. per la germanoj por politikaj propagandaj celoj.

**ESSENER VOLKSZEITUNG.** 21 kaj 22 okt. Ambaŭ n-roj enhavas artikolojn pri la Internacio Katolika resp. anoncon pri okazonta kurso.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

### NIA MONATA LETERO EL USONO.

San Francisco, novembro 1920.

Nun oni trovas en Usono iom pli da laboristoj ol laboron. En sept. 1919 ekzistis vera manko de laboristoj neleteraj, sed nun ekzistas plimulto, kaj oni povas antaŭvidi, ke post nelonge estos pli da lertaj laboristoj ol laboro.

Tial laboristoj estas multe pli facile dungeblaj ol antaŭe; ankaŭ multaj fabrikejoj ne funkcias, kaj aliaj nur funkcias iom de la tempo.

Pro kio la plimulto de laboristoj? oni demandas. Kiam la diversaj fabrikejoj ĉesis funkcii por nuligo de mendoj (kiun kaŭzis kaj publiko per ne-aĉeto kaj manko de kredito ĉe la bankoj), multaj personoj ektrivigis sen laboro. Preskaŭ samtempe multaj antaŭaj soldatoj, kiuj deŝtis la milito nur vagas de unu laboro al alia, ekkomencis vere labori. La granda nombro de enmigrantoj ankaŭ helpis. Dum la jaro 1920, ĝis 1 julio, envenis okcent mil enmigrantoj.

Nun la prezoj ekkomencas malaltiĝi, kaj sendube tio ne estas portempa sed daŭra malaltiĝo, kaj ĉi tiu komenco. S-ro Henry Ford, fabrikanto de aŭtomobiloj, malaltiĝis siajn prezojn je 31%, tiel ke ili nun estas preskaŭ samaj kiel antaŭ la milito. La Franklin Motor K-io ankaŭ malaltiĝis siajn prezojn je 21%, kaj tuj poste la plimulto de la aŭtomobil-fabrikantoj faris same. La Asocio de Koton-fabrikantoj malaltiĝis siajn prezojn je 55%. Ĝis nun la salajroj pagataj ne malaltiĝis kaj oni ne atendas tion tuj.

Kelkaj el la katalogoj de grandaj firmoj montras novajn prezojn 10 ĝis 30% pli malaltajn ol dum 1919. Tiu ĉi prezoj estas por ĉiuj aĵoj: meblaro, manĝaĵo, vestaĵoj, lan- kaj koton-ŝtofoj, ledajoj ktp.

Kelkaj profitemuloj vere perdis multon, precipe kiuj penis troprofite je sukero. Kiam antaŭ kelkaj monatoj sukero teli altiĝis, ekonomia leĝo ekfunkciis, kaj sukero venis ĉi tien el ĉiuj partoj de la tergloblo kun la rezulto, ke ni nun havas pli ol ni povas uzi dum la proksimaj ses monatoj, proksimume du milionoj da tunoj, kaj ni kutime uzas 91 funtojn po persono kaj jaro (multe pli ol iu alia popolo), t. e. entute kvar milionoj da tunoj po jaro.

La registaro usona kalkulas, ke la valoro de la sukero, kiu tenas la profitemulojn, malpliĝis en valoro ĉ. 250 000 000 dol., kaj ĉiuj personoj tre bedaŭras ĉion ĉi — mi kredas, ke ne! Nun estas nia tempo por ridi.

Aliaj najtoj daŭras pruntepreni monon de Usono. La angla-franca 500 000 000 dol. prunte-

preno de 1915 estis pagota la 15. okt. 1920, kaj por pagi sian parton, la francoj ree prunteprenis 100 000 000 dol. je 8% obligacioj. La tuta serio estis aĉetata dum malpli ol horo, kio montras la fidon, kiun la Usonanoj havas je Francujo. La cetera parto de la 250 000 000 dol. de Francujo estos pagata, kaj pere de kredito, kiun ĝi havas ĉe ni, kaj per oro el Francujo.

Kiam Francujo ricevis sian parton de la angla-franca pruntepreno de 1915, ĝi ricevis la ekvivalenton de 1 250 000 000 frankoj, tio estis, kiam francoj valoris po kvin por dolaro. Hodiaŭ (po 14 frankoj por dolaro) Francujo sendas 250 000 000 fk. en oro (aŭ 50 000 000 dol.), kaj aĉetante 100 000 000 dol., ĝi devas pagi 1 400 000 000 fk. Alivorte, Francujo hodiaŭ pagas 1 650 000 000 fk. por pagi tri kvinonojn de la 1 250 000 000 franka pruntepreno, kiun ĝi ricevis antaŭ kvin jaroj.

La ebleco, ke Francujo povas fari tion ĉi, montras la forton de ĝia financa kondiĉo.

Norvegujo nun petas pruntepreni la sumon de 15 000 000 dol. kaj sian uzata por starigi hidroelektrajn staciojn en Norvegujo. Oni intencas elektrigi ĉiujn fervojojn en Norvegujo.

A. S. VINZENT.

### LETERO EL PALESTINO.

Haifa, oktobro 1920.

Palestino, la centra lando de la malnova mondo — Azio, Afriko kaj Eŭropo — estas kaj restas ankaŭ la centro de la civilizacio, de la spirito kaj precipe de la religioj. Ni kristanoj nomas ĝin la Sankta Lando. Teatraĵo de la ĉefaj okazintaĵoj de la religio, dufoje ĝi estis tuta kristana, de la kvara ĝis sepa jarcentoj kaj en la jarcento dekluda de la krucmilitistoj. Hodiaŭ nur du urboj palestinaj havas plimulton kristanan, Bellehermo kaj Nazaret; ĉi tiu ni ne povas permesi, ke Palestino perdu sian kristanan karakteron, ĝi estas antaŭ ĉio la hejmlando de la Kristanismo. Ankaŭ la multnombraj mahometanoj konsideras ĝin flanke de Mekka kaj Medina kiel la plej sanktan landon. 80% de la nunaj enloĝantoj estas mahometanoj. La judoj, al kiuj la *Entente* donis Palestinon kiel hejmlandon, ne estas multe pli ol 10% de la loĝantaro. Ili ne estas ŝatataj, nek de la mahometanoj nek de la kristanoj. Ĉerte, la nuna juda ĉefadministranto estas homo prudentega, kaj la monabundo de la judaro tre efika. Tamen dum multe da jaroj la sankta lando bezonos fortan anglan armeon por resti kvieto. Konsekvence la malriĉa lando devas pagi impostojn pli gravajn ol antaŭ la milito, kaj sincera kontentiĝo nenie estas trovebla krom meze de kelkaj zionistoj kaj oficiistoj.

La limoj de la sankta lando ne estas difinitaj, nek norde nek oriente. Tial malkvieteco en tiuj regionoj, manko de terkulturo kaj komerco. Eĉ post la limdifino inter franca kaj angla protektorejo, enviane unu al alia, la komerca situacio restos malfacila; ĉar mankos la libera interkomunikado kun la riĉaj landoj de Hauran kaj Damasko. Palestino estas hodiaŭ unu el la landoj kun plej karaj vivrimedoj kaj plej granda manko de loĝejoj.

Konerne la germanaj koloniistoj, la ĉefadministranto montrigis bonvolega. Ĉiuj intermigiĝoj en Egiptujo revenis kaj preskaŭ ĉiuj Germanujoj senditoj estas permesataj reveni. Eĉ kelkaj jam revenis, kaj ĉi tie, ekzemple, ni ree havas germanan apotekon. Laŭ lastaj ĵurnaloj de Jeruzalemo ankaŭ ĉiuj havenoj palestinaj nun malfermiĝis al germanaj komerc-ŝipoj.

La fervojo Haifa-Damasko, interrompita dum kelkaj semajnoj, ree funkcias regule. P. E. S.

## ENIGMOJ.

Manuskriptojn de enigmoj oni bonvolu sendi al S-ro Max Bülin, Kronprinzenstr. 33, Bad Godesberg, Germ.

### SOLVOJ el n-ro 74.

1. Leporo, 2. Astronomio, 3. Rafano, 4. Eleonoro, 5. Villareal, 6. Ukrainio, 7. Okarino. — La Revuo.

Op-ilo, opio.

Komerca vojaĝisto.

a) Ametisto, b) Turkio.

### NOVAJ ENIGMOJ.

#### SILAB-ENIGMO.

a, ar, bro, cis, da, da, do, du, e, fun, io, ke, ko, ko, laŭ, lo, ma, ma, men, mo, ni, no, no, nu, os, te, ti, ti, to, to, tra, tru, ur, vem.

Oni kunmetu la silabojn fiamaniere, ke rezultos:

1. libro konata de ĉiu E-isto, 2. kreskaĵo, 3. monato, 4. lando, 5. birdo, 6. scienco, 7. ĵira nomo, 8. metalo, 9. fiŝo, 10. voĉdonado ĉe la antikvaj grekoj.

La komencaj literoj de ĉiu vorto legetaj de supre al malsupre estas egalaj al la unua vorto.

#### KVARSILABA ENIGMO.

En ĉielo vi ne trovas la unuan, Kelkajfoje trinkas ni la bonan duan, Lastajn ni volonte ja ne vidas; Ĉiuj nin printempe tre ĝojigas. (L. Funken.)

#### LOGOGRIFO.

Kio milimilionbilias per enmeto de unu litero? (Ch. G. Stuart-Menteth.)

#### ŜERCAJOJ.

a) „Kato — Kato“; b) „li-O-ni“; c) (G. Steiner, Győr.)

[SOLVOJ publikigotaj en sekvoita numero.]

## Ludo de Sonorigejoj\*.

Vespere en la kora, dolora monotono

Subite jen eksonas la sonorila sono

Kun frapo tremanta,

Kun voĉo ĝemanta.

La batoj ekbruas,

fenestron ekskuas,

kaj milde ekfluas

Muĝado la sorĉa.

Ho, son' sonorila,

Vi tondrosimila

kaj tamen trankvila,

Ravanta kaj dolĉa!

Doloro de koro premanta, dronanta

Sufokas. Mi vokas al bronzo sonanta:

Ho, svingu la langon,

Vi tondre batanta!

Ho, plendu via granda

Trarungo la landon!

Ho, plendu la fonton

De l'sango, riproĉo!

Ho, tondru la voĉo

Kaj fendu la monton,

Eslingu flamlangon

De l' sen! malamanta,

De l' blinde flamanta,

Volinta la sangon:

Atingu la kanto

La koran profundon

Por vindi la vundon

Sangintan pro vanto.

Ho, sorĉu la senton

Indulge lulante

Kaj larmojn rulante

Eksolvu la penton!

Ho, ringo de kantoj,

Vi fondu la rondon,

Vi fandu la mondon

En rond' de amantoj!

Kor' brulas, voĉ' lulas, min levas, mallevas,

Pri flamo de l' amo flagrantaj mi revas,

Ke ruĝaj flamlangoj

disflugas tra landoj,

ekruĝas la vangoj

En fratricinapreno.

Kaj frate en rondo

solena, tra mondo

ekmuĝas la ondo

De l' kant' pri kompreno!

\* \* \*

Sed, ho ve, tremante,

Lastfoje ĝemante

Kun mortadanta muĝo forsonas bronza tono

Kaj kaptas min denove dolora monotono.

D-RO KOLOMANO KALOCSSAY.

\* Tiu ĉi originala Esp. poemo de nia hungara samideano estas grandioza provo pri la esprimkapabece de nia lingvo; ĝi estas arta rimulado, eĉ en interno de linioj, kaj partoj limitadas efektive la sonorilegatan sonon. La poemo bonege taŭgas por deklamado, eĉ rekte por neesperantistoj.

Jus aperis:

## Plena duobla Vortaro de Esperanto por Bulgaroj

(kun fundamenta gramatiko)

aprobata de la Ministerio de Publ. Instruado.

Tre utila ankaŭ al fremduloj lernantoj bulgaran lingvon.

Prezo 3.50 sv. fk.

Mendebila ĉe la aŭtoro:

Ivan Krestanoff, Pirdop (Bulgario).

